Decembro 2016

Svenska Esperantotidningen

# La Espero

2016:4

## Europeiska språkdagen

På årets europeiska språkdag som firades den 27 september i Europahuset i Stockholm deltog över 700 högstadie- och gymnasieelever från Stockholmsområdet och Uppsala. I likhet med tidigare år deltog Esperantoförbundet, representerade av Olof Pettersson, Tatu Lehtilä och Fanny Tjäder, tillsammans med ambassader och kulturinstitut för andra språk, Internationella biblioteket och Utbildningsradion.

*Olof Pettersson*




## 130+ stödjare för Esperanto-Gården 20+



130+ por Esperanto-Gastigejo 20+

Signalu vian subtenon per respondo por ke estu "130+ subtenantoj por Esperanto-Gastigejo 20+" fine de nia 20-jariĝa jubilea jaro. Respondu antaŭ la 15a de decembro 2016 kaj vi partoprenos LOTUMON DE TRI PREMIOJ de Eldona Societo Esperanto.

Sojle de la 130-jariĝo de esperanto Esperanto-Gastigejo en Svedio volas kolekti 130+ subtenantojn (respondojn al la enketo). Helpu nin konatigi nian domon kaj sukcesi!

Koran dankon pro via atento! Ek al respondo!

Nome de la estraro
Anna Ritamäki-Sjöstrand, prezidanto de la kooperativo Esperanto-Gården i Lesjöfors

*Obligatorisk

E-postadress *

Din e-post

La alvoko respondi la kampanjan enketon, signali sian subtenon por nia Esperanto-Gastigejo, disvastiĝas rete. La enketo okazos ankaŭ svedlingve, eblos do elekti ĉu respondi svede aŭ esperante. Vidu p 7.

Kampanjen vänder sig till esperantotalande i hela världen, såväl personer som aldrig hört om Esperanto-Gården tidigare som trotjänare i Sverige och andra länder som ges möjlighet att framföra synpunkter som kan behandlas på ett systematiskt sätt. Det är möjligt att besvara enkäten även på svenska. Se sid 7.

## Partoprenis en BET-52

Vidu paĝon 7





Plej maldekstre: Ingrid Näsholm. Spegula bildo de Ingrid inter aliaj portretoj. Temis pri muro kun portretoj kaj inter ili spegulo por mem esti inter la portretoj.

Ingrid kun Marian Dobrzynski kaj Anna Striganova.

# LA ESPERO

**Organ för Svenska Esperantoförbundet**
ISSN 0014–0694
2016 • 104-a jarkolekto
Fondita en 1913
**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson
**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**
Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08–34 08 00.
svenska@esperantoforbundet.se
**E-post till redaktionen:** laespero@esperantoforbundet.se
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson
**Tryck:** Pingvinpress, Råå
**Prenumeration:** 200 kr.
Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.
Plusgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.


# ESPERANTOFÖRBUNDET

**Besöksadress:** Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00
**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm
**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se
**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se
**Öppettider:** Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!
**Plusgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123
**Medlemsavgift:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).
**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

# ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Box 2276, 103 17 Stockholm
**Postgiro:** 578–5
**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/
**E-post:** eldona@esperantosverige.se
**Telefon**: 070-5850054

# ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
**Nätsida:** www.esperantogarden.se
**E-post:** info@esperantogarden.se
**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

**sänds till** Bengt Olof Åradsson
Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574
**e-post:** laespero@esperantoforbundet.se

| | *Stoppdatum* | *Utkommer senast* |
|---|---|---|
| Nr 1 | 1 februari | 1 mars |
| Nr 2 | 15 maj | 5 juni |
| Nr 3 | 20 augusti | 15 september |
| Nr 4 | 1 november | 1 december |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. sv

# LA ESTRARO

**Enklare kontaktmöjligheter**

Efter funktionärsträffen i Undenäs i september gjorde vi ett utskick till samtliga klubbar och grupper om att utse minst två personer som kan stå som mottagare för e-post riktade till adresser på formen ort@esperantoforbundet.se, t.ex. malmo@esperantoforbundet.se. Syftet med dessa adresser är att kunna hänvisa till dem när nya intresserade vill komma i kontakt med en klubb i närheten. Men självklart också för att göra det lättare för såväl klubbar som grupper att sinsemellan ta kontakt med varandra. Dock är det flera klubbar som ännu inte besvarat utskicket så därför en påminnelse: Meddela e-postadresser till minst två personer i klubben (helst i styrelsen och gärna fler, men kan också vara andra aktiva funktionärer) till SEF – svenska@esperantoforbundet.se !

**Medlemsavgiften**

I förra numret av La Espero upplyste vi om att vi kommer att införa rutinen att till direktmedlemmarna skicka faktura på medlemsavgiften. På fakturan (som medföljer detta nummer av tidningen) står att den ska uppfattas som en avi. Vi har ännu inte från dataföretaget fått besked om huruvida texten kan ändras från "faktura" till "avi". Klubbarna kommer att få "fakturor" till sina medlemmar, om de inte meddelat att de vill övergå till central avgiftsuppbörd.

**Hyreskontraktet för EsperantoCentro uppsagt**

I enlighet med vad som diskuterats och informerats om det gångna året och många gånger tidigare, har vi nu formellt sagt upp hyreskontraktet för lokalen på Vikingagatan i Stockholm. Vi har kvar lokalen till och med augusti 2017, så Stockholmsklubbens verksamhet där kan fortsätta fram till sommaren.

**Kongress eller vad?**

En fråga som varit på tapeten flera år är att vi behöver en kongressekreterare. En person som ansvarar för kongresserna tillsammans med ett par andra, som har mer lokal anknytning till aktuell ort. Det har inte funnits någon klubb, som åtagit sig uppgiften på flera år. Det har sedan flera år varit svårt att hitta klubbar, som tagit på sig uppgiften. Jobbet har istället till stor, eller största, delen fått göras av styrelsemedlemmar. Det vill säga: det har inkräktat på styrelsens arbete och lett till att planerade uppgifter, t ex hemsidorna, fått skjutas åt sidan. Den situation vi haft en tid är inte hållbar. Skall styrelsen ha detta som en uppgift är det dags att diskutera en radikal förändring av evenemanget.

**Kassör i SEF sökes**

En annan uppgift som är aktuell att diskutera är kassörens. Det är dags att lära upp den kommande, men det har inte lyckats att hitta en villig kraft än. Arbetet kan vid behov delas upp i bokföring, fakturering, utbetalningar och medlemsregister. Hur det skall administreras framöver behöver diskuteras. Kanske skall bokföringen skötas av en bokföringsfirma? Vad finns det för andra möjligheter? Har du några idéer, så dela gärna med dig av dem.

*Styrelsen*

# SVEDA KONGRESO 2017

**Svenska esperantokongressen 26–28 maj 2017 kommer att äga rum i den historiska bruksorten Forsvik vid Göta Kanal. Boende är ordnat på Forsviks vandrarhem, som är en gammal arbetarlänga med bevarade lägenheter. Där kommer några möten med få deltagare också att äga rum. I övrigt förläggs aktiviteterna till lokaler i det gamla brukskontoret, granne med vandrarhemmet.**



Manuella slussen.
Foto: TS Eriksson /Wikipedia

**Program**
**Fredag:** Ankomst, "interkona vespero".
**Lördag:** Årsmöten SEF, ILEI och ESE, träff med deltagare i Rondo Langlet, kongressmiddag.
**Söndag:** Morgonandakt och årsmöte KELI, utflykt och hemfärd.

Detaljerat program kommer under våren.

I år siktar vi på en mer konferensliknande kongress med utrymme för diskussioner och idéutbyte. LKK tar gärna emot förslag på lämpliga ämnen.

**Boende**
Vi har bokat hela vandrarhemmet som har 12 rum med totalt 34 bäddar. Utseende och faciliteter varierar, så ock priserna. Sängplatser hyrs ut för hela kongressen, dvs för två nätter.

I vandrarhemmet finns också ett gemensamt kök för samtliga med två uppehållsrum.

Planritning och andra upplysningar om vandrarhemmet finns på deras hemsida http://forsviksvandrarhem.se/.

**Rum och priser:**
- Rum med 2–3 sängar, toa i korridor – 500 kr (Rum 3, 9 och 12)
- Rum med 2–3 sängar med del i kök – 560 kr (Rum 4+5, 6+7 och 10+11)
- Rum med 3 sängar med kök samt toa med dusch – 620 kr (Rum 2, 8 och 13)

Tänk på att sängkläder och städning inte ingår i priset. För sängkläder tillkommer 80 kr per person, och för städning 120 kr per rum.

***Först till kvarn gäller***, samt som vanligt, att bokning av rum bara gäller om man också har anmält sig till kongressen, samt att man betalat inom definierad tidsperiod.

Den som inte vill bo i vandrarhemmet får själv ordna sitt boende. Det finns B&B i Forsvik, Undenäs samt Karlsborg där det även finns hotell. Beläggningen kan vara hög – beställ i tid.

**Måltider**
Frukostbuffé kan förbokas till ett pris av 80 kr/dag. Betalas i samband med anmälan.

Lunch och kvällsmat erbjuds på ***Café Ada*** och ***Forsviks Café & Mat*** till en kostnad av ca 85– 180 kr som du själv betalar. Uppge vid anmälan om du vill att vi bokar plats.

Kongressmiddagen äter vi på Forsviks Café & Mat på lördagskvällen. Du som vill delta uppger detta i anmälan så att vi kan boka plats. Mat och dryck betalar du själv.

Det finns ingen matbutik i Forsvik så den som vill stå för sina måltider själv får ta med sig allt som behövs, alternativt köra till Undenäs eller Karlsborg, ca 10 minuter med bil.

**Utflykt**
Vi planerar en båttur på Göta Kanal under söndagen. Mer information kommer i nästa nummer av La Espero.

**Anmälan och avgifter**
Kongressavgift kvarstår från tidigare år, dvs vuxen/ungdom (tom det år man fyller 21) vid betalning:
- före 31 jan 2017 – 300/150 kr
- 1 feb - 31 mars – 400/200 kr
- 1 april - 30 april – 500/250 kr
- efter 1 maj – 600/300 kr

Anmälan görs på formulär i EsperantoSverige eller (om du inte har tillgång till dator) på telefon 08-34 08 00 (telefonsvarare).

Betalning sker till pg 14 74 29-5.

Var vänlig observera att anmälan blir giltig först när betalningen inkommit. Både betalning och anmälan skall ske inom avsedd period.

**Resebidrag till ungdomar**
SEF erbjuder resebidrag till unga deltagare som anmäler sig till svenska esperantoarrangemang. Bidraget är en hjälp till unga aktiva esperantister.

Vi ser fram emot tydliga och sanningsenliga ansökningar och vill understryka att vi har begränsade ekonomiska medel för detta program. Vi erbjuder också en viss ersättning till unga utländska esperantister, därför att deras närvaro hjälper svenska ungdomar att skapa internationella kontakter.

Läs mer på stipendio.esperantoforbundet.se

# Kallelser

**Svenska Esperantoförbundet** kallar till årsmöte i Brukskontoret i Forsviks bruk lördagen den 27 maj 2017. Klockslag meddelas senare.

Obs! Motioner till årsmötet ska vara förbundsstyrelsen tillhanda senast två månader före årsmötet, dvs 26 mars 2017.

***Styrelsen***

Förlagsföreningen **Esperanto u.p.a.** kommer att ha sin stämma i samband med svenska esperantokongressen.

***Leif Nordenstorm***

Även **ILEI-se** planerar sitt årsmöte under kongressen. Detaljer meddelas senare.

***Sten Svenonius***

# SVEDA KONGRESO 2017

La sveda esperantokongreso 26–28 de majo 2017 okazos en la historia uzina vilaĝo Forsvik ĉe Göta Kanalo. Loĝado estos oferita en la gastigejo de Forsvik, kiu estas eksa laborista loĝdomo kun aŭtentaj apartamentoj. Kelkaj malgrandaj kunvenoj ankaŭ okazos tie; la aliaj aktivadoj okazos en la malnova uzina oficejo, kiu situas tute proksime.



Forsviks bruk.
Foto: Harri Blomberg / Wikipedia

***Programo***
***Vendrede:*** Alveno, interkona vespero.
***Sabate***: Jarkunsidoj de SEF, ILEI kaj Eldona Societo Esperanto, renkontiĝo kun partoprenantoj de Rondo Langlet, kongresa bankedo.
***Dimanĉo***: matena diservo kaj jarkunsido de KELI, ekskurso kaj hejmeniro.

Pli detala programo aperos dum la printempo.

Ĉi-jare ni celas kongreson kiu pli similas al konferenco kun loko por diskutoj kaj interŝanĝo de ideoj. LKK volonte ricevos proponojn pri taŭgaj temoj.

***Loĝado***
Ni rezervis la tutan gastigejon, kiu havas 12 ĉambrojn kun entute 34 litoj. La ĉambroj havas malsamajn aspektojn kaj kvalitojn, sekve malsamajn prezojn. Ni forluas la dormlokojn por la tuta kongreso, t e por du noktoj.

En la gastigejo troviĝas komuna kuirejo por ĉiuj kaj du sidĉambroj.

Se vi volas vidi la planojn de la du etaĝoj, vizitu la hejmpaĝon http://forsviksvandrarhem.se/.

- Ĉambro kun 2–3 litoj – 500 kr, necesejo en la koridoro (ĉambro 3, 9 kaj 12)
- Ĉambro kun 2–3 litoj + komuna kuirejo – 560 kr (ĉambro 4+5, 6+7 kaj 10+11)
- Ĉambro kun 3 litoj kun kuirejo kaj necesejo kun duŝo – 620 kr (ĉambro 2, 8 kaj 13)

Litotukoj kaj purigado de la ĉambroj ne estas inkluditaj en la prezo. Aldoniĝas SEK 80 po persono por luo de litotukoj kaj SEK 120 po ĉambro por purigado, se vi mem ne zorgas pri tio.

La unuaj mendintoj havos la plej bonan elekton de ĉambro. La mendoj nur validas se oni aliĝis al la kongreso antaŭ la kongreso mem kaj pagis ene de difinita tempoperiodo.

Se vi ne volas loĝi en la gastigejo, vi devas mem serĉi aliajn loĝeblecojn. Troviĝas loĝejoj en Forsvik, Undenäs kaj Karlsborg kie ankaŭ troviĝas hotelo. Okazas aliaj aranĝoj samtempe – mendu loĝejon kiom eble plej frue.

***Manĝoj***
Matenmanĝa bufedo mendeblas je la prezo de 80 kr tage, pagenda lige al la aliĝo.

***Café Ada*** kaj ***Forsviks Café & Mat*** ofertas tag- kaj vespermanĝoj je kosto de pr 85-180 kr kiun vi mem pagas. Kiam vi aliĝas, sciigu nin ĉu vi volas ke ni mendu lokon en la manĝejo.

La kongresa bankedo okazos sabate vespere en Forsviks Café & Mat. Se vi volas partopreni bv mencii tion en la aliĝilo por ke ni povu mendi lokon por vi. Vi mem pagos por kio vi volas manĝi kaj trinki.

Mankas manĝaĵvendejo en Forsvik. Tiu kiu volas mem zorgi pri siaj manĝoj devas kunporti ĉion necesan, aŭ veturi al Undenäs aŭ Karlsborg pr 10 minutojn per aŭto por aĉetumi.

***Ekskurso***
Ni planas boatekskurson en Göta Kanal dum la dimanĉo. Pliaj informoj venos en la venonta numero de La Espero.

***Aliĝo kaj kotizoj***
Eksterlandanoj ne pagas kongreskotizon sed ja la kostojn por loĝado kaj manĝado.

Por aliĝi, bonvolu uzi la formularon en EsperantoSverige kaj sendu la pagon al la sveda poŝtĝirkonto 14 74 29-5. Se vi ne kapablas uzi la formularon vi povos voki nian telefonon +46 8 34 08 00 (respondilo).

Bonvolu noti ke via aliĝo validas nur ekde kiam ni ricevis vian pagon.

***Vojaĝsubvencioj al gejunuloj***
SEF oftertas vojaĝsubvencion al junaj partoprenontoj (ĝis inkluzive la kalendara jaro kiam ili iĝas 30-jaraĝaj) aliĝontaj al svedaj esperantoaranĝoj. Subvencio estas helpo por junaj esperantistoj aktivi. Ni ankaŭ ofertas partan subvencion al junaj eksterlandanoj, ĉar ilia ĉeesto efikas al svedaj junuloj krei internaciajn kontaktojn.

Legu pli en stipendio.esperantoforbundet.se

# LA ESTRARO - daŭrigo

**Nytt på webben – bakom kulisserna**
Vi arbetar med att uppdatera innehållet på webbsidorna, främst esperanto.se, men än så länge sker mycket av det "bakom kulisserna".

**Bokkatalog**
Under funktionärsträffen i Undenäs bestämdes att vi ska göra en digital förteckning över de böcker som finns i SEF:s bibliotek samt erbjuda våra klubbar och medlemmar att också registrera våra böcker där. På det sättet skulle vi alla kunna få en överblick över vilka esperantoböcker som finns i Sverige och var de finns. I förlängningen skulle detta också kunna möjliggöra utlåning av böcker och försäljning av dubletter och överexemplar.

**Studiecirklar via Skype**
På åtminstone två ställen i landet (Sundsvall och Luleå) undersöks möjligheterna att hålla studiecirklar i samarbete med studieförbund – på distans via Skype. Läs mer om detta i Diskutejo (och delta i diskussionen) på intere.se.

*Styrelsen*

# Bli medlem i UEA 2017

**UEA är den globala organisationen** för esperantister. Den har officiella relationer med FN och UNESCO. UEA behöver ditt stöd för att uppfylla sina viktiga uppgifter att:

- sprida Esperanto
- verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt och
- därmed öka förståelsen mellan folk och länder.

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. REVUO ESPERANTO och har en omfattande bokförsäljning. Som direktmedlem får du köpa böcker från UEA:s bokservice med 10 % två gånger om året, och ifall du är MA-medlem får du rabatten vid obegränsat antal köp. UEA anordnar även varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du tidningen ESPERANTO, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet (MA och MJ) dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

MJ och MG medlemmar kan läsa tidningen ESPERANTO på nätet, om UEA får mailadressen. Du betalar avgiften genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange vad pengarna avser.

Det går även bra att gå till UEA:s hemsida UEA.org och välj aliĝilo, fyll i den och betala

Avgifterna för år 2017 är följande:

**MA 580 skr.** Direktmedlem med årsbok och tidningen ESPERANTO. Om man är under 35 år blir man automatiskt medlem även i ungdomsorganisationen TEJO och får tidningen KONTAKTO.

**MJ 230 skr.** Medlem med årsbok och nätversionen av tidningen ESPERANTO. I övrigt se ovan.

**MG 92 skr.** Medlem med ”Gvidlibro”, och nätversionen av tidningen ESPERANTO. Ger inte nedsatt kongressavgift.

**DM 14500 skr.** ”Dumviva Membro” Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MA.

**DMJ 5750 skr.** Livsmedlem med årsbok: Betalar för hela livet 25 gånger avgiften för MJ; erhåller årsboken och nätversionen av tidningen ESPERANTO.

**SA 370 skr.** Abonnemang av tidsskriften ESPERANTO, utan medlemskap i UEA.

**KTO 220 skr**. Abonnemang av tidsskriften KONTAKTO, utan medlemskap i UEA.

**SZ 1160 skr.** Avgift för ”Societo Zamenhof”, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.

**PT 690 skr.** ”Patrono de TEJO”, betalar 3 gånger avgiften för MJ för att stödja TEJO (ger inte medlemskap): Erhåller tidningen KONTAKTO och andra utgivningar av TEJO

Upplysningar: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, lgh 1303, 931 38 Skellefteå
Tel. 0910- 733810 leif.holmlund@telia.com

# Prenumera!

**SEF erbjuder sina medlemmar** att prenumera på esperantotidningar för 2017. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, lgh 1303, 931 38 Skellefteå
Tel 0910-733810. leif.holmlund@telia.com

| Tidning | nr/år | pris kr | flyg |
|---|---|---|---|
| Esperanto | 11 | 370 | |
| Esperanta Finnlando | 5 | 242 | |
| Esperanto en Danio | 4 | 129 | |
| Femina, aperados en virtuala eldono | | | |
| Heroldo | 17 | 461 | |
| Juna Amiko | 3 | 175 | |
| Kontakto | 6 | 220 | |
| La Jaro | 1 | 58 | 87 |
| La Kancerkliniko | 5 | 266 | |
| La Ondo ne plu aperos papere | | | |
| La Ondo rete (pdf kaj ePub | 11 | 141 | |
| Literatura Forio | 6 | 436 | |
| Monato | 11 | 540 | 570 |
| Monato retversio | | 324 | |
| Norvega Esperantisto | 6 | 131 | |
| Oomoto, nur rete | | | |
| www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf | | | |
| Ret-ventoj | | | |
| www.esperanto.hu/eventoj/ | | | |
| Scienca Revuo, senpage ensaluti kaj legi | | | |
| https://scienca-revuo.info | | | |

## 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, Korea Respubliko, 22 - 29 de julio 2017

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

| | – 2016-12-31 | – 2017-03-31 | 2017-04-01 – |
|---|---|---|---|
| 1. Direkt medlem i UEA(ej MG) | 1754 | 2194 | 2632 |
| 2. Icke direkt medlem i UEA | 2194 | 2730 | 3915 |
| 3. Komitatano, medföljande, handikappad eller Ungdom (född mellan 1987-01-01 och 1996-12-31), som är medlem i UEA | 878 | 1121 | 1316 |
| 4.Medföljande, handikappad eller Ungdom, som inte är medlem i UEA | 1316 | 1658 | 1999 |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 96-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, Lgh1303, 931 38 Skellefteå, tel 0910-733810; Leif.holmlund@telia.com
eller skrivas ut på UEA hemsida http://www.uea.org/

Det går även bra att via UEA hemsida fylla i anmälningsblankett och betala direkt till UEA.

Obs! Eftersom kurserna är osäkra kan avgifterna komma att justeras.
Ovanstående avgifter är beräkande utifrån kursen 1 € = 9,75 SEK

# Manuskripto pri vortaro de Roland

La manuskripto pri vortaro esperanto-sveda, kiun Roland Lindblom (1931-2016) ellaboris, estas nun diskutata kun la estraro de Eldona Societo. Kiel notite en la pasinta numero de La Espero, laborgrupeto ordigis la materialon dum la somero.

Plano de Eldona Societo estas skani la paperajn manuskriptajn paĝojn, kiel sekureca kopio, kaj poste trovi kunlaborantojn por enskribi la tekstojn komputile. Por la enskribo necesas bona scio pri esperanto kaj la sveda, ĉar la manuskriptaj paĝoj estas grandparte manskribitaj.

Eldona Societo serĉas volontulojn por tiu venonta laboro, kaj Leif Nordenstorm estas kontaktulo, je la adreso:
leif.nordenstorm@gmail. com.

*Ulla Luin*

# Köp en julklapp till dig själv eller till någon annan

- Helt ny! Lilla esperanto-ordboken. Tredje omarbetade upplagan. Kompletterad med nya ord bl.a. inom områdena data, mobiltelefoni och mat. 196+12 s. 100 kr.

Några av våra senaste utgåvor:

- Arne, la ĉefido. Rakonto el la vikinga tempo de Leif Nordenstorm. 116 p. 50 kr.
- Flugorango rakontas. Kolorilustrita libro de Johan kaj Andreas Galtung. 38 p. 100 kr.
- Ĥodapro. En tarda sorpotempo. Poemo de Folke Wedlin. 63 p. 85 kr.
- Kroze - proze. Literatura esearo de Sten Johansson. 158 p. 150 kr.
- La korto. Rakonto de Kristian Lundberg. 146 p. 70 kr.
- Söka bostad i storstaden och andra noveller översatta från originalen på esperanto till svenska. BRA JULKLAPP! 231 s. 150 kr
- Vizaĝoj Novelaro 2000-2009 175 p. 150 kr.





På vår hemsida www.esperanto-gbg.org/eldona/ finns vår kompletta katalog.

Beställ från:
ESPERANTOFÖRLAGET
c/o Nordenstorm,
S:t Olofsgatan 26,
753 32 Uppsala
eldona@esperantosverige.se

# Raporto pri BET-52

Ĉi-somere, du membroj de la esperanto-societo de Sundsvall (Amika Rondo) havis novan esperantan sperton, BET-52 (Baltiaj Esperanto Tagoj), baltiska esperantodagarna en Birŝtonas, Litovio.


Åke Näsholm

Estas Ingrid kaj Åke Näsholm, kiuj diras la sekvan: Rete, ni vidis la interesajn informojn kiuj fariĝis nin scivolaj. Plue la kostoj estis kompare malaltaj kaj tio por ni gravis. Ni skribis kaj petis pri la programo, kaj ĝi aspektis ekscita, do ni aliĝis al la evento. Kiam ni surteriĝis en la ĉefurbo Vilnius atendis malnovaj esperantoamikoj, kiujn ni ne vidis en pli ol 20 jaroj. Ili helpis nin per bagaĝoj kaj veturigis nin la 10 mejlojn al Birŝtonas.

Dum la restado estis vere agrable denove renkonti esperantistojn kies amikeco dum longa tempo al ni gravis. Kia ĝojo renkonti Roman la unuan esperantiston kiun mi ekkonis en la malnova Orienta Europo jam antaŭ 50 jaroj, rakonti pri niaj impresoj kaj memoroj kaj aŭdi pri lia forta memoro de posta vizito en mia ubo kaj tiama gustumado de aĉida heringo. Alia renkonto estis Tuomo la tiam juna finno kiu iam visitis SEF kongreson en Sundsvall kaj por unua fojo povis interparoli kun esperantistoj. Litovaj geamikoj estis pluraj kaj lastfoje nia vizito estis tuj post la liberiĝo de Sovetunio kaj ilia fiero kaj feliĉo tiam estis forta. Do ni havis multajn gajajn revidojn. Partoprenis preskaŭ 300 esperantistoj el ĉirkaŭ 28 landoj.

Positiva detalo estis la ebleco mendi malmultekostan bongustan manĝaĵon por la tuta semajno en proksima dom. Tiu signifis ke grandparte de kongresanoj manĝis kune kaj dum la manĝo eblis ekkoni novajn esperantistojn.

La programo estis tre ampleksa kun somera universitato kun lertaj instruistoj, distraj rakontoj kaj amuzaj kaj muzika distraĵo kun konataj artistoj kiel Ĵomart kaj Nataŝa, Mikaelo Bronŝtejn kaj JoMo.

Teatro kaj diversnivelaj lingvokursoj en esperanto estis popularaj. Estis tiom da interesaj aranĝoj eĉ samtempe ke ni devis elekti. La vario de prelegtemoj estis vasta kaj mi (Ingrid) mem prelegis pri Rilatoj inter homoj kaj bestoj, temo kiu tre interesas min. Åke plej ŝatis la spontaneajn vesperajn kaj noktajn grupiĝojn kun kantado kaj trinkaĵoj.

Eblis partopreni en duontaga boatekskurso kaj tuttaga ekskurso por vidi interesajn konstruaĵojn en la distrikto. Estis iom da problemoj por Åke kiu ekhavis doloron en piedo atingi la elirlokon de la ekskursoj kiuj ests unu aŭ du kilometrojn for de la kongresejo, ĉar en Birŝtonas ne ekzistas taksioj. Li uzante sufiĉe da tempo tamen sukcesis. Vere tiu semajno restos por ni agrabla memoro, kaj ni deziras denove iam partopreni en BET.

*Ingrid kaj Åke Näsholm*

## 20-jara Esperanto-Gastigejo kampanjas por atingi 130+ subtenantojn

## 130+ stödjare för Esperanto-Gården 20+

La alvoko respondi la kampanjan enketon, signali sian subtenon por nia Esperanto-Gastigejo, disvastiĝas rete.

La enketon ni disigas interalie per la nova www.facebook.com/esperantogarden. Per la kampanjo ni invitas kunkrei rondon kun personoj volantaj informiĝi, eble ankaŭ agadi, subteni la gastigejon per laboro, per mono, per ideoj, per disvastigo de informoj kaj, ne malplej grave, per kuraĝigaj vortoj.

La kooperativo Esperanto-Gastigejo kreiĝis danke al enorma sindediĉo de multaj esperantistoj. La ĉefa iniciatinto Lennart Svensson daŭre kontribuas per sia entuziasmo kaj laborforto kaj volas subteni novajn generaciojn transpreni la gvidon. Pluraj personoj helpas de tempo al tempo, sed ni estas pli malmultaj nun, kaj ni ne estis tre videblaj.

Ni, la nunaj aktivuloj, sentas ke ni bezonas subtenon por venki la defiojn de kostoj kaj – ni konfesas – ioma velko de entuziasmo. Dum la pasinta jaro ni faris grandan fortostreĉon financan kaj homan realigante gravajn renovigajn konstrulaborojn. Estas tempo por valorigo de la atingaĵoj kaj por nova komenco.

Tial la estraro de la kooperativo je la fino de la 20-jariĝa jubileo de la gastigejo sojle de la 130-jariĝo de Esperanto lanĉas kampanjon *"130+ subtenantoj por Esperanto-Gastigejo 20+"*. Ni alvokas vin ĉiujn helpi nin disvastigi la informojn inter esperanto-parolantoj. Respondinte la enketon vi ricevos regulajn informojn, inter alie ankaŭ pri niaj merkatigaj paŝoj por turistoj kaj aliaj, kiuj povus lui niajn ĉambrojn.

★

**Esperanto-Gårdens styrelse** efter årsstämman den 22-23 oktober 2016 Ordförande/prezidanto: Anna Ritamäki-Sjöstrand, Mariehamn; vice ordförande /vicprezidento: Lennart Svensson, Lesjöfors; sekreterare/sekretario: Anna Eriksson, Upplands Väsby; nya/novaj: Gunnar Olsson, Skövde & Martin Strid, Borlänge; Suppleanter/Anstatŭantoj: Douglas Draper, Oslo Sonja Persson, Mora.



Gastoj de la malferma tago kaj partoprenantoj de la jarkunveno, de Esperanto-Gastejo. La knabino estas Sigrid Sjöstrand, filino de Anna.

## Kraftsamling för 20-åriga Esperanto-Gården

Esperanto-Gården firade 20 år med öppet hus den 22 oktober 2016 i samband med vår höstträff och årsstämma. Vi syntes på små affischer på turistbyråerna i Värmland och runt om i Lesjöfors, på Filipstads hemsida och på stora ljustavlor vid infarterna till Filipstad och både före och efter evenemanget i Filipstads tidning. "Gården satsar framåt" var rubriken och det är vad som behövs för att de enorma insatser som gjorts under åren ska bära frukt. Länk till artikeln finns förresten på vår nya Facebook-sida, där man även hittar vår kampanj.

Nu gäller det att involvera hela esperantosamfundet i ett hitta lösningar (hitta stödpersoner och efterträdare till Lennart hör till de viktigaste). Vi har ett renoverat hus. Vi har stora lån, men vi har inga långivare som aktivt kräver oss på pengar, utan allas vilja har varit att gården ska vara en motor för esperanto och internationell förståelse. Gården ska finansieras till stor del med vandrarhemsgäster, men också med esperantoevenemang.

*Vi vill ha en blomstrande esperantorörelse i Norden och en internationell räckvidd för Esperanto-Gården.*

Bara för att något är svårt, så behöver det inte vara omöjligt. Vi har två trösklar att överstiga för att uppnå en positiv spiral i stället för en negativ – mänskligt engagemang och pengar:

- Esperantorörelsen måste ta sig an Esperanto-Gården igen. Det måste bli lätt att komma till Esperanto-Gården och hjälpa till, det måste kännas meningsfullt.
- Vi måste ha så bra standard att det lönar sig för oss att marknadsföra oss, så att vi verkligen marknadsför oss och levererar så att vi får ordinarie inkomster.

Det kostar mer än 10 000 kronor i månaden för el, vatten och avlopp – effektivt för ett hus med 23 övernattningsrum och tre våningar. Det är mycket pengar. Med nuvarande prisnivå, försiktigt räknat, kräver det 60 gästnätter per månad – och fortsatt gratisarbete. Några helgevenemang samt ett eller två större evenemang betyder mycket.

Vi är tacksamma för allt som gjorts under årens lopp, också för alla råd vi fått (också för dem som jag eller vi andra i styrelsen inte har haft krafter att följa). Vi vill fortsatt mana till kraftsamling för vårt gemensamma samlingsställe. Vi ska vara i kontakt med våra stödjare regelbundet – äntligen, igen – efter en lång tid då vi knappt varit synliga. Vi vill få till stånd en ny nybyggaranda i stil med den på 90-talet när verksamheten byggdes upp.

***Styrelsen genom Anna***

## Evenemang – Eventoj
### Esperanto-Gården 2016-2017

**2 - 4 dec 2016** Ett trevligt veckoslut med lokalrevy, god mat, frivilligarbete och amatörfilmarna Olof Mattsson och Daniel Embretsen fortsätter undersöka företeelsen Esperanto-Gården, Lesjöfors och Lennart efter trevligt umgänge på gården förra nyåret. /
*Spertu agrablan semajnfinon kun loka teatro, kuna manĝado kaj filmantoj.*

**29 dec 2016 - 2 jan 2016**
Nyår i vår uppvärmda kursgård, med turismtema (umgås med experter på esperantoturism) /
*Novjara kunestado (gravaj diskutoj kaj kontaktoj por la estonto)*

**Preliminärt 2017**/
*Nekonfirmitaj planoj 2017*

**Påsken/pasko 2017**
Zagreba metodo-tema för lärare och elever /
*por instruemuloj kaj lernemuoj*

**Maj 2017**
Arbetsvecka/
*laborsemajno*

**Juli**
Esperantokursoj kaj Kultura Esperanto-Festivalo

# Tomas Jansson

1951–2016

Tomas Jansson mortis la 26 oktobro 2016, je la aĝo de 65 jaroj, post longa malsano. Li naskiĝis en kampara domo en urbeto Hällefors meze de Svedio, kaj lernis esperanton jam kiel lernejano. Post gimnazio en apuda urbo Filipstad li ekstudis lingvojn en Uppsala, sed relative rapide decidis anstataŭe edukiĝi kiel kuracisto. Li eklaboris kiel kuracisto en Uppsala, kaj dumtempe plustudis, kaj lia doktora disertacio aperis en 1998 pri plibonigo de terapio je mamkancero. Dum iom da jaroj li laboris en Norvegio, kaj poste laboris kiel supera kuracisto en Stockholm. Apud la laboro li gvidis antikvariaton en Uppsala. Lia kono pri malnovaj libroj ankaŭ donis al li parttempan okupon ĉe konata faka biblioteko ”Hagströmer” en Stockholm, kun speciale medicinaj libroj.

La esperantista vivo de Tomas Jansson komenciĝis jam kiam li estis 14-jara, kiam li partoprenis junularan aranĝon en Svedio. Danke al stipendio li povis vojaĝi al junulara esperanto-aranĝo en Hungario kiel 16-jarulo, kio multe influis al lia estonta aktiveco. Dum la postaj jaroj li estis ofta partoprenanto ĉe junularaj aranĝoj en diversaj landoj de Eŭropo. Li estis estrarano de SEJU (Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo), kaj post tio li estis estrarano de SEF (Sveda Esperanto-Federacio) en la 1970-aj jaroj. Kune kun la tiama edzino Ingrid Maier li kontribuis al la aranĝo de universala kongreso en 1980. Kiel medicinisto kaj kiel aktivulo por politiko kaj paco, li estis membro de esperantaj fakaj asocioj. Post la periodo kiam li loĝis en Norvegio, kune kun la dua edzino Gunilla Frykholm, li revenis al Svedio kaj estis membro de la estraroj de Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors kaj la estraro de Eldona Societo Esperanto en Svedio. Lia granda scio pri malnovaj libroj estis bona helpo kiam oni komencis rearanĝi la esperanto-librojn en la esperanto-centro en Stockholm. Li estis ofta partoprenanto de



kongresoj, kaj ankaŭ gvidis aŭkciojn je malnovaj esperanto-libroj. Kvankam li jam estis malsana, li tre ĝojis partopreni kongreson en Lille 2015.

Tomas postlasas tri filinojn, kaj la granda aro da esperantistoj, kiuj konis lin, sentos la mankon, ne nur de liaj profundaj scioj, sed ankaŭ de lia bona humoro kaj ŝercemo.

*Ulla Luin*

# Hans Dahl

13 april 1924 – 1 september 2016

Hans Dahl lasis nin. Li vivis longan vivon, fariĝis naŭdek du jarojn aĝa.

Mi ekkonis Hans antaŭ preskaŭ kvindek jaroj, kiam li ekstudis Esperanton. Tiutempe estis klubo en Nynäshamn kaj li tuj membriĝis. Hans suferis de disleksio, kio malfaciligis por li lingvolernadon, sed pro la logika gramatiko Esperanto ne kaŭzis al li problemojn. Li estis prezidanto de la klubo dum kelkaj jaroj. Hans ekkorespondis frue kun germano, kies hejmon li vizitis plurfoje kune kun la edzino Stina. Post preskaŭ kvindek jara geedzeco Stina mortis kaj Hans renkontis Gunvor Spector; kune ili kunvivis kaj vojaĝis inter alie en Tanzanio kaj Portugalio.
Hans estis sperta desegnisto de ergonomiaj laboriloj, sed ankaŭ kapablis en pluraj metioj; li dum jaroj partoprenis la laboron plibonigi Esperanto-Gården.

Dum la jaroj ni sporade havis kontakton kaj mi kontentas pro printempa vizito, kiam ni iomete parolis pri komunaj memoroj.

Hans, ripozu pace!

*Anita Dagmarsdotter*